


Libera Esperanta kantaro-vikio iĝis 1000-kanta! Dum la lastaj tagoj kvanto de kantotekstoj, haveblaj en kantaro-vikio superis 1000! Tio estas rezulto de kelkjara internacia kunlaboro, farata de esperantistoj el la tuta mondo.
Danke al la vikia teknologio, la kantaro estas malfermita por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri muziko. Iu kunlaboranto povas enmeti novan kantotekston, alia korektas erarojn, plua alia povas aldoni muziknoton aŭ kompletigan informon, ktp.
Paŝo post paŝo la kantaro kreskas kaj iĝis vera helpilo por muzikemuloj. Ĝin uzas kaj komencantoj kaj spertuloj. La kantaro estas fonto de kantotekstoj por lernantoj kaj gvidantoj de E-kursoj. Fanoj trovas en ĝi kompletajn albumojn de ŝatataj muzikbandoj kaj videaĵojn de kantoj.
Aŭtoroj kaj tradukantoj uzas ĝin por publikigi siajn verkaĵojn. En la vikio haveblas kaj klasikaj kaj modernaj kantoj. Multas kantoj, tradukitaj el naciaj lingvoj, movadaj, por korusa plenumado, infanaj, rokaj, popaj kaj aliaj.
En la vikio vi povas trovi kanton diversmaniere: laŭ kategorio, nomo aŭ per frazo entekste. Kantoj estas aranĝataj laŭ albumoj kaj albumoj eniras diskografiojn de la koncerna aŭtoro aŭ muzikbando. Por prezentado de la kantoj vi povas trovi muzikfoliojn, akordojn por gitarludado. Vi povas sekvi la kantotekston kaj ankaŭ spekti videaĵon aŭ uzi karaokeon.
Internacia teamo de kunlaborantoj gratulas uzantojn de kantaro-vikio je tiu cifero - 1000, kaj invitas ĉiujn, kiuj ĝis nun ne vizitis la kantaron fari tion, trovi ŝatatajn kantojn, aldoni komentojn kaj lasi impresojn en gastlibro.
Adreso de la kantaro-vikio: **http://ikso.net/kantaro/**




**Nekutima Esperanta aranĝo - en trajno !**
**Al la sekvajara Azia Esperanto-Kongreso en Mongolio oni povas veturi per speciala karavano en la Transsiberia Trajno. Tiu vojaĝo de Moskvo (aŭ Peterburgo) tra Siberio - apud la lago Bajkalo! - daŭros 10-12 tagojn, do ĝi mem estas iu ekskluziva Esperanto-renkontiĝo...**
**En junio 2010 estos organizita pertrajna vojaĝo tra Rusio survoje al la 6a Azia Esperanto-Kongreso (Mongolio, 2010). Nuntempe pretas kunvojaĝi kelkaj geesperantistoj el Francio, Italio, Germanio, kiuj aŭ jam trajnumis survoje al UK en Jokohama (Japanio, 2007), aŭ informiĝis pri la efektivigita vojaĝo "E-karavane".**
**Itinero de la E-karavano al Mongolio estas ankoraŭ provizora kaj ĝia konkretiĝo dependas de preferoj de partoprenontoj. Oni elektu unu el variantoj. La varianto, kiu kolektos pli da jesoj, estos efektivigita. La prezoj de la vojaĝo vin surprizos kaj allogos!**
**Pliajn detalojn kaj konkretan retpaĝon pri tiu speciala evento en junio 2010, Mongolio, trovu per la "Internacia Kalendaro de Esperanto-Aranĝoj" ĉe http://www.eventoj.hu**